4-a Jaro. N-o 176 APERAS SEMAJNE 16. Februaro 1928



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanty | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

PRI SVEDIO KAJ LA KONGRESURBO

Tre ofte oni povas legi en la eksterlanda gazetaro artikolojn pri Svedio, kiuj montras, ke la opinio pri tiu lando estas plej kurioza: "Svedio estas malgranda lando, lokita ĉe la Norda Poluso. La ĉefurbo nomiĝas *Kristiania,* kaj alia konata loko estas *Nordkap* — Norda promontoro — de kie oni povas vidi la noktomezan sunon dum la tuta somero. Alia urbo en Svedio estas *Stokholmo,* kiu estas tre bela. Tie tre ofte blankaj ursoj promenas sur la stratoj. Popolo konsistas el laponoj, kiuj estas vestitaj per feloj."

Ĉu vi ne volas viziti tiun strangan landon kaj samtempe partopreni la 8-an mondkongreson de SAT, kiu okazos en Göteborg, haven-urbo ĉe la okcidenta marbordo?

Certe vi deziras. Sed, por ke vi, post via alveno, ne tuj iru al la kongresa komitato, dirante, ke vi estis trompita, ne trovante blankajn ursojn, ni nun volas komuniki la veron pri la glacia lando tie en nordo.

Malgraŭ ĝia norda loko la klimato en Svedio estas sufiĉe milda, dank' al la Golfa fluo, kiu varmigas la nordokcidentan parton de Eŭropo. En la suda parto de Svedio la printempo komenciĝas ĉirkaŭ la 1-a de majo. Kiam la manifestacioj de la unua de majo okazas, tiam ankaŭ verdiĝas la unua folio de betulo, la ĉefa foliarbo de la lando. Post unu monato oni havas someron, kiu floras dum tri helaj monatoj. Sudlandanoj diras, ke la norda somero estas stranga travivaĵo. La noktoj estas tre mallongaj. En la norda Svedio oni eĉ tute ne havas noktojn dum la somermeza tempo. La suno estas videbla dum la tuta tagnokto. Pro tio oni nomas Norvegion kaj Svedion, "la landojn de noktomeza suno".



La haveno de Göteborg

La plej bela kaj grava urbo de Svedio estas la ĉefurbo, Stokholmo, poezie nomita "Venecio de la Nordo". Ĝi havas ĉ. 453 000 loĝantojn.

Göteborg estas laŭ grandeco la dua urbo en Svedio kaj havas nun ĉ. 231 000 loĝantojn. Antaŭ pli ol 300 jaroj ĝi estis konstruita sur kelkaj ŝtonaj montetoj en vasta marĉo apud la rivero *Göta älv* (Jëta elv) ĉe ĝia enfluo en Nordan Maron. Holandanoj konstruis urbon laŭ sia nacia stilo. Oni fosis multajn kanalojn tra la urbo kaj ĉirkaŭ la tuto oni starigis bastionojn. Kelkaj el tiuj kanaloj nun estas plenplenigitaj, sed ankoraŭ restas *Stora hamnkanalen* (Granda havenkanalo) kaj *Vallgraven* (Bastiona fosaĵo) kiel monumentoj de tiu tempo.

Baldaŭ holandanoj estis venkitaj de germanoj, kiuj fariĝis la novaj estroj de la urbo kaj ricevis grandajn privilegiojn de la sveda ŝtato. Post 1650 svedoj mem estis kapablaj mastrumi sian urbon.

Tre frue Göteborg fariĝis la plej grava komerca kaj ŝipirada urbo de Svedio. Ŝipoj el Göteborg veturis al Ĉinio, Hindio kaj aliaj malproksimaj landoj, kaj grandaj riĉaĵoj amasiĝis ĉe la komercistoj kaj ŝipmastroj. Multaj el ili redonis parton de siaj riĉaĵoj al la urbo por konstruado de malsanejoj, banejoj, muzeoj bibliotekoj ktp. Tiamaniere Göteborg fariĝis urbo tre konata pro siaj valoraj, kulturaj institucioj.

Por la kongresa komitato

G. Thorstenson.

★ Partoprenu la VIII-an SAT-Kongreson en Göteborg 14.—19. aŭgusto 1928 ★

MASKOBALOJ

Estas nun la periodo, dum kiu oni aranĝas en Germanio (ankaŭ aliloke, la *Red.*) la maskobalojn. Estas kutimo tradicia, ke ĉiujare ĉirkaŭ la sama tempo ripetiĝas tiaj baloj. Ekspluatantoj kaj ekspluatatoj, ĉiuj havas siajn maskobalojn. Tiuj baloj estas posteuloj de la grandaj "karnevaloj".

Laboristo simpla ja ne povas viziti iun ajn maskobalon aranĝatan de la ekspluatantoj, ĉar por tio li ne havas sufiĉon da mono. Mi unufoje havis okazon ĉeesti tian maskobalon kiel servosoldato (kelnero) dum mia aktiva soldatservo. Ion similan mi neniam plu vidos. La prezoj de la varoj estis treege altaj, bonega profito por la hotelmastro.

La korkoj de la ĉampanvinaj boteloj flugis plafonon, vino abunde fluis, ankaŭ plej distingan kafon oni trinkis. Brandon, likvoron oni trinkis el kuvetoj. Oni dancis, drinkegis, ŝvitis, fumis, malĉastis, ridaĉis, skandalis kaj fine — vomis, vomis unu sur la alian. La atmosfero, kvankam haladza, estis naciema, ŝovinista, ĉar la ebriuloj ja ĉiam sentas sin "fortaj" en imago, sed kadukaj sur la kruroj. Nu, ni ja scias, ke dum tiaj diboĉadoj oni malŝparas la rabitan monon de la proletoj.

Malbonaj sekvoj de *tiuj* maskobaloj estas la publikaj maskobaloj aranĝitaj por la "popolo". Dum tiuj festoj oni ja ne tiom drinkegas kaj vomas, ĉar la proletoj irantaj tien ne posedas la sufiĉan monon. Tamen tiuj aranĝoj celas vuali la malbonan situacion de la Proletaro. La "ĝuo" de tiuj maskobaloj estas, kiel spertuloj diras, sole produkto de burĝa ideologio. Konsekvence, ankaŭ tiujn produktojn kontraŭbatali plej akre estas tasko de ĉiu klaskonscia laboristo.

Kutime du aŭ tri el la plej originale maskitaj personoj estas premiataj. Kaj estas strange, ke maskitoj en "oficiraj uniformoj" preskaŭ neniam mankas. Tio pruvas la spiriton, kiu regas en tiaj "porpopolaj" maskobaloj. Ĉu ne bedaŭrinde, ke eĉ laboristaj unuiĝoj sekvas tiun malbonan ekzemplon? Ekzistas ja proletoj, kiuj ĉiam havas monon por tiuj "festoj", dume por kulturaj celoj ili neniam havas!

Arguso.

Vortoj de Prof. Cart

devas troviĝi sur la tablo de ĉiu, kiun interesas la evoluo de esperanto.

La dua libro post **Lingvaj Respondoj** de Zamenhof; ĝi devas esti atente studata kaj relegata.

Prezo: **2.— mk. g.**

Havebla ĉe Administracio de SAT

POR LA PATRIOJ

Dum la milito unu el la plej ampleksaj militkaptitejoj troviĝis proksime de l' fervojlinio: Main-Weser, inter la vilaĝoj Rengershausen kaj Oberzveren. Kiu vagonare veturas tra la tiea belega valo, ekvidas fruktodonan ebenaĵon. Kelke da kilometroj pli norde ĉe la horizonto de l'akcipitra arbaro, aperas loko kie staris centoj da barakoj por militkaptitoj. Tuj post la eksplodo de l' milito oni aranĝis ĉi tiun kaptitejon kaj ju pli longe daŭris la kruela interbuĉado, des pli multaj viktimoj transportis la militaj barbaroj al la kaptitejo. La plimulto neniam revidis la alsopiritajn liberecon kaj hejmon. Kaŭze de malsato dum 1915—1918, ekfuriozis kruela tifa epidemio, kiu forrabis multajn K-dojn el la supre-menciita regiono. Amasa mortiĝo, jen ĉi-tie per epidemio en trankvila loko, jen tie ĉe la fronto per ĝenerala buĉado!



Tombejo kun pli ol 1800 britaj militkaptitoj apud Kassel-Niederzveren

Proksime de l' iama kaptitejo, iĝis granda tombejo kun miloj da kadavroj. Pli poste la britoj, kies viktimoj nombris pli ol 1800, apartiĝis kaj, pasintan aŭtunon, la angla registaro inaŭguris bone konstruitan, ornamitan tombejon, kiu havas proksimume 7200 kv. m. Samtempe la Socialdemokrata Partio simpatie solenis la mortintojn.

Apude sur samgranda spaco, restis enterigataj belgoj, francoj kaj rusoj. Laŭ interkonsento de l' iama packontrakto, la belgaj kaj francaj kadavroj, tuj post la milito, estis transportataj al hejma tero. Do, nur la rusoj restas, proksimume 1750, kaj ripozas en propra tombejo apud la brita.

Ambaŭflanke de tiuj tombejoj, estas mizeruloj, kiuj, elvicigitaj de l' fronto, suferis la plej bedaŭrindan sorton.

Meze de l' nuna rusa tombejo, leviĝas monumento, enhavanta latinlingve la jenan epitafon: *Militibus Galliae, Russiae, Britanniae, Belgiae en Chassalae castris defunctis! Requiescant in pace!*

Naŭzite kaj dolorigite de tia patriotaĵo, mi forlasis ĉi-tiun lokon. Senkulpaj K-doj diverslandaj mortis ĉi tie pro malsato, por la nura profito de l' kapitalistaro. *(265.)*

Nacia frenezeco

Jen ĝis kie povas konduki frenezeca naciemo.

Kvin ordonoj al la vera italiano:

1. Italio estas la nura lando el la tuta mondo, kiu meritas esti la plej granda, la plej potenca;

2. Italio estas la plej forta, la plej neimitebla lando en la mondo;

3. Italaj leĝoj estas la plej demokrataj en la tuta mondo;

4. La homoj regantaj nuntempe Italion estas la plej lertaj; al ili oni devas senti respekton kaj obeon;

5. Mussolini estas ĉiam kaj ĉiel prava.

Tiuj sensencaĵoj estas la konsekvenco de l' ĉiutaga enhavo de la faŝista gazetaro. Sed oni ne devas forgesi, kiamaniere agas la danĝeraj frenezuloj por atingi sian celon. Ni povas aldoni kvin veraĵojn konstateblajn de ĉiu civilizita homo.

1. Italio estas lando, kie oni persekutas homojn havantajn la plej etan homarec-internacian senton; tie ne estas permesate iom dubi pri la perfekteco de la nuna socisistemo;

2. Italio estas lando, kie la estraro tute ne kapablas zorgi pri industrio, kamparo ktp. Mizeregan situacion de l' tuta Laboristaro kaŭzis la faŝista financsistemo;

3. Italaj leĝoj estas burokrataj trompoj por ekspluatadi la Proletaron; ili permesas ĉiuspecajn perfortojn kaj ŝtelojn;

4. La homoj regantaj Italion forpelis kooperativojn, bruligis laborborsojn, gazetpresejojn, bibliotekojn, ankaŭ dometojn kaj meblojn de laboremaj, honestaj kaj inteligentaj laboristoj, ili turmentas kaj mortigas pro emo al tio;

5. Mussolini ... la lasta tirano.

Kompilis: *Venĝio.*

Indiĝenaj moroj en Angola

(Portugala okcidenta Afriko)

(Daŭrigo dua)

En la socia vivo de indiĝenoj la "kimbanda" estas unu el plej superajranguloj.

Heredinte la scipovon de siaj prauloj, konstante prilaborante fetiĉaĵojn, sorĉaferojn kaj similajn aĵojn, li estas, laŭ la simplanima kredo de siaj samrasuloj, persono kapabla ĉion ajn diveni, ĉion ajn klarigi.

Pro tio li estas postulata ĉe ĉiuj aferoj, ĉe kiuj la kruda neklereco de la indiĝeno montriĝas nekapabla.

Se iu malsaniĝas, oni vokas lin por diveni la kaŭzon de l' malbonfarto.

Se iu mortas, li devas divenindiki la kaŭzinton de l' mortiĝo por liveri lin al la enda laŭ ilia kodo puno.

Se iu malkonsentas je la decido de indiĝena tribunalo, li mem finfine decidas pere de siaj divenmetodoj.

El tio devenas, ke de la "kimbanda" dependas ĉiuj prisanecaj aferoj kaj ankaŭ ĉiuj, kiuj simple koncernas la korpon aŭ la fizikstaton.

Ĉe preskaŭ ĉiuj indiĝenaj gentoj la cirkumcido de junuloj estas normala kutimo, kun-samtempa iniciato (ekinstruo) pri la vivo de plenaĝuloj (maturaĝuloj). Ĉi tiu duobla tasko estas plenumata ankaŭ de la "kimbanda".

Proksime al viriĝaĝo la indiĝenaj knaboj estas instruataj pri la vivo de la viroj. Kiam ili estas, plej ofte 12-jaraj, aŭ inter -sia 14-a kaj 16-a vivjaro, la "kimbanda" de l' vilaĝo devas instrui-ilin pri ĉio, kion viro bezonas scii, tiel same pri la seksa vivo, kiel ankaŭ pri la socia.

La junuloj estas kondukataj de la "kimbanda" en senloĝejan malproksiman kampon, kie ĉiuj bivakas akompanataj de 10 aŭ 12 junuloj ĵus antaŭe ekinstruitaj, kiuj servas al la "kimbanda", kiel helpantoj.

Tie, sidantaj sur oportune metata glata ŝtono, la knaboj estas cirkumcidataj per bone akrigita tranĉilo, kaj instruataj dum la kuracado.

Dum la daŭro de ĉi-kuracado ĉiuj seksaj rilatoj estas malpermesataj en la vilaĝo; sed tuj kiam ties fino anonciĝas, la koncerna loĝantaro sin preparas por solene ricevi la novajn cirkumciditojn.

Ĉi tiuj revenas en la vilaĝojn portante arbotrunkon sur la ŝultroj, kune marŝas al la loĝejo de l' "sobeta" aŭ "kilamba"[1]), akompanataj de ĉiuj anoj de l' vilaĝo, kaj tie demetas sian ŝarĝon, ricevante kiel donaco kelkajn metrojn da drapo.

La akompanintoj de l' suferuloj ricevas ankaŭ kelkajn grandajn potojn de "maluvu"[2]) kaj, poste, la vilaĝestro deklaras, ke li konsideras kiel viron ĉiun el la operaciitoj, kiuj rajtas reiri en siajn loĝejojn kaj de tiam ĝuadi ĉiujn plezurojn de l' vivo kaj plenrajte partopreni en ĉiuj sociaj agoj.

Poste, dum 4 tagoj, en la vilaĝo regas orgiaj dancoj kaj festenoj. Ĉe iuj la estro de l' vilaĝo donacas bovon por tia celo.

Inter la gento el regiono Amboim (Ambuim') ĉi-kutimo estas tre kurioza kaj aparte karakteriza. Pro tio mi ĝin priskribas:

La ceremonio komenciĝas per la foriĝo de la malbonaj spiritoj ("kazumbi", laŭ indiĝena lingvo), kiujn la "kimbanda" forigas el la operaciitoj per kokideto. Poste, en arbaron, en malproksiman kaŝitan lokon, kie serpentumas rivereto, la "kimbanda" iras por plenumi sian doloriĝan taskon, ĉe kiu li uzas la sukon el la bananarbo, kiel sangohaltigilon. Ŝtipo el bananarbo, pertranĉile kavita, ankaŭ servas por ricevi la ŝprucitan sangon. Kaj dum unu tuta monato — tiel longe daŭras la kuraco kaj la ekinstruo de la knaboj — estas malpermesate al virinoj preterpasi tie kaj al "soba" foriri el sia "libata"[1]). Al suferantoj ne estas permesate manĝi flugilojn kaj kapojn de birdoj, nek felojn kaj kapojn de ratoj, kiujn ili devas konservi kaj ĉe l' returno kunporti por ilin meti sur arbo ĉe la unua krucumiĝo de l' vojo.

Por donaci al la "soba", ili ankaŭ kunportas, returnirante en la vilaĝon, po unu fasko da ligno por bruli kaj pikilon da ratoj (kelkajn ratojn, kune trapikitajn sur longa ligna pikilo[2]).

La soleno, ĉiam konsistanta el kelktagaj konstantaj dancadoj kaj festenoj, finas la ceremonion.

Ĉe ĉiuj ceteraj gentoj, kvankam estas iaj apartaj detaloj, ĉi-kutimo laŭsekvas samajn normojn: la izoliĝo; la operacio plenumata de l' "kimbanda"; la instruado pri seksaj funkcioj; kaj returno en la vilaĝon inter solenaj manifestacioj, post kio la junulo estas taŭga por ĝui ĉiaspecan liberon kaj elekti edzinon.

Tre kuriozan taskon plenumas ankaŭ la "kimbanda" ĉe la gento "Ambuim'". Laŭ la raporto, el kiu mi elĉerpas ties priskribon, tiu kutimo, je kiu elvidiĝas ia superstiĉa kredemo, ne estas sekvata de aliaj gentuloj:

Kelkajn tagojn post la naskiĝo de infano la patro serĉanta la karesojn de sia edzino, kuntiriĝas je la momento de la geneza spasmo kaj ricevas en ĉifonon la embriigan semon; la "kimbanda" aldonas ian mirigvirtan polveton kaj la ĉifono estas metata ĉe la zono de l' infano, kiu de tiam kapablas foriri el la loĝejo ŝirmata kontraŭ la aero kaj malbonaj rigardoj.

Unu kroman ceteran taskon la "kimbanda" plenumas: Li prizorgas kaj eĉ skulptas la idolojn adoratajn de la indiĝenoj, ĝenerale forigas ĉiujn malbonajn spiritojn kaj alvokas la bonajn. Plenumas la oferojn de vivaj bestoj (siatempe ankaŭ tiujn de homaj vivoj) en specialaj okazoj, kiel ekzemple post morto de "soba".

Pri tiu tasko religieca, kvazaŭpastra, la detaloj mankas al mi kaj do ne permesas perfektan priskribon.

La leganto, certe, tion pardonas al mi.

J. P. Barreira.

[1]) Vilaĝestroj = ofte ankaŭ ministroj de la "soba" (indiĝena reĝo); la vorto "sobeta" signifas: malgranda "soba".

[2]) Vino el palmarba suko.

[1]) Aro el kabanoj, kie loĝas la "soba", liaj edzinoj kaj liaj ministroj.

[2]) La indiĝenoj estas tre frandemaj je ratoj.

Por la juna Sacco

Sacco kaj Vanzetti estas mortigitaj, falis kiel viktimoj de la usona klasjusteco. Ankoraŭ ĵuras la mondo, eĉ iuj burĝaj rondoj, ne forgesis la skandalon. Sed eĉ la Proletaro post kelka tempo, pro propra mizero, pli kaj pli malmemoros iliajn nomojn, postkiam ĝi metis ilin en la liston de la proletaj martiroj.

Vi scias, ke Sacco skribis antaŭ sia morto leteron al sia dektrijara filo, provante veki en tiu ĉi letero fajreron de proletkonscio en la koro de la juna, por ke ĝi brulu en la estonta viro kiel neestingebla flamo. Ni efektivigu la volon de la mortinto! Ni alvokas la tutan revolucieman gejunularon, zorgi ke la filo de Nikola Sacco fariĝu klaskonscia proleto-revoluciulo. Li ricevu nian helpon. Ni donu al li la rimedojn kleriĝi; por ke li estonte uzu sian scipovon en la servo de la proleta afero. Li plenumu tiamaniere la testamenton de sia patro kaj helpu venĝi ne nur la patron kaj ties amikon, sed ĉiujn K-dojn same kiel ili mortigitajn por la Proletaro. Do, ni pagu la kostojn por lia edukado ĝis fino de lia klerigo. Ni riskas kiel sole duban ŝancon, ke eble li poste ne estos tiom aktiva kaj kapabla, kiom ni esperas. Sed ni ĉiam pensinte ŝanĝos kun li, por ke li sentu la intereson de la proleta gejunularo tutmonda.

Praktike ni proponas: Ni — kelkaj miloj da junaj eŭropanoj — konsentas pagi ĉiutage almenaŭ kupran moneron. Ni portas tiun devigon por la tuta daŭro de lia klerigado, do minimume dek jarojn. Garantion por la laŭorda efektivigo donas eŭropa komitato, kiu ankaŭ duonjare raportos pri la farto de Sacco, ktp.

Ĉiuj K-doj, kiuj tuj emas devigi sin, sendu sian adreson al: *Max Barth, Waldkirch im Breisgau* (Germanio).

Gazetoj de la junula movado estas petataj enmeti tiun ĉi alvokon.

Nia klubo

(Letero speciale verkita por "S-ulo" de administranto de l' klubo K-do *I. Lepejko.*)

Ĉefa klubo de Samara profunuiĝo de fervojistoj estas nomata "Samara fervoja laborista klubo je nomo de Revolucio de jaro 1905". Ĝi unuigas 10 000 membrojn de l' profunuiĝo. La ejo de la klubo mem sufiĉas por 600 personoj. Pli frue en ĉi konstruaĵo estis ejo por societaj kunvenoj de komercistoj, literaturistoj, borsmakleristoj ktp.

La klubo enhavas vidsalonon, promensalonon kaj vicon da aliaj ĉambroj por laboro de iniciatemaj organizoj, nome: legejo-ripozejo, salono por korpkulturo, medicinkabineto, junulsekcio, dramrondeto, ukrainia dramrondeto, societo de klubamikoj, orkestro de blovmuziko, harmonik-orkestro, orkestro de kordinstrumentoj, rondeto de esperanto, rondeto de formtranĉado kaj de kudrado, rondeto de libramikoj, viva gazeto (?) ("blua bluzo"), rondeto por lerni muzikon, biblioteko kun 35 000 volumoj da diversaj libroj, kino-aparato kaj vico da aliaj rondoj.

En ĉiu iniciatema organizo estas elektata plenumoficejo, kiun gvidas administrantaro de l' klubo elektata de la membroj.

Laboro de la klubo pasas laŭ plano. En samara fervojkruco estas 5 similaj kluboj. Ilia strukturo estas la sama.

En sekvontaj leteroj ni konigos la agadon de niaj iniciatemaj organizoj, celojn kaj taskojn de nia laboro, organizadon de la tuta laboro, starigon de la buĝeto ktp. Estas tre dezirinde sciiĝi de vi, karaj amikoj, kiaj demandoj vin interesas, kaj ni penados detale konatigi vin kun ĉio. Sen iuj trograndigoj kaj plibeligoj ni diros al vi nur realaĵon, kiun vere ni havas.

Esp-igis *B. Jeleznjakov* (5583).

TAGO EL MIA VIVO

Mi estas konduktoro ĉe la ĉefstacidomo de Leipzig. Pro la diverseco kaj malreguleco de miaj deĵoroj ne estas eble doni klaran bildon pri la labortempo aŭ deĵoro en iu aparta tago. Oni kalkulas tage naŭ horojn da reala labortempo, sed tio povas esti ĝis 260 horoj en monato, se (laŭ la koncernaj paragrafoj de la laborleĝo) la laboro aŭ deĵoro estas facila. Por plenumi diversan laboron ĉe la vagonaro, mi devas laŭ la leĝo deĵori ¾ horon por prepari min. La vojo de mia loĝejo ĝis la ĉefstacidomo daŭras 40 minutojn. Ekzemple mi deĵoras en la vagonaro, kiu veturos al Chemnitz. Ĝi ekveturos je la 8,13 h. Mi estas devigata pretigi min hejme du horojn antaŭ la ekveturo.

Dum la veturado mi kontrolas, skribas biletojn, helpas kaj informas la vojaĝantojn, atendas la signalojn ktp., por ke ne okazu malagrablaĵoj kaj plendoj. La vagonaro alvenas je la 11,03 h. al Chemnitz, post kio mi devas plenumi diversajn laborojn, antaŭ ol mi povas forlasi la vagonaron. Tiu tempo estas kompensata pokvaronhore.

Laŭ la laborleĝo mi havas paŭzon de la 11,18-a ĝis la 1,54-a h. Sed malfruiĝo aŭ alia laboro ofte devigas min pli longe labori ĉe alveno aŭ antaŭ foriro. Mi iras poste en la restadejon por veturpersonaro en Chemnitz, kaj renkontas kolegojn de diversaj stacioj. Dum la paŭzo mi skizas esperantaĵojn, legas gazetojn, librojn, ĉar hejme mi ne ĉiam havas sufiĉe da tempo, varmigas mian kunportitan manĝaĵon ktp.

Kiam estas la 13,30 h., mi pretigas min por iri al la Leipzig-a rapidvagonaro, kiu ekveturas je la 14,39 h., farante la saman supreciitan laboron, kaj alvenas je la 16,16 al Leipzig.

Post plenumo de la jam citita laboro mi iras al perono 23, kie haltas la vagonaro por Grossbothen. Mi ekveturas je la 17,14 h. kaj alvenas je la 18,23 h. al Grossbothen.

Kiam krepuskiĝadas, mi devas eklumigi la kupeojn kaj signalojn, kaj kiam



kun la sama vagonaro mi reveturas je la 18,41 kaj alvenas je la 19,49 al Leipzig, mia taga deĵoro estas finita.

Mi notas en mia libro 10,10 h. de reala labortempo, rigardas la deĵorplanon, kaj kiam estas sufiĉe da tempo inter la du deĵoroj, mi iras volonte piede hejmen.

Kiam mi estas alveninta en mian loĝejon, mi trarigardas supraje la alvenintajn leterojn, gazetojn, esperantaĵojn ktp. kaj enlitiĝas.

Max Häckel (1162), *Leipzig.*

"La **vorto** estas kvazaŭ vojeto en maro, sed vojon postlasas la **faro**!"

Henrik Ibsen.

Difinoj

Sennaciismo. — Kultura doktrino kies ĉefaj celoj estas: 1. Malaperigo de ĉiuj nacioj kaj ŝtatoj konsiderataj kiel sendependaj unuoj; 2. mondmastrumado kaj raciigo de la produktado laŭ sciencaj metodoj; 3. unuecigo de ĉiuj mezuriloj kaj kalkuliloj; 4. starigo de racie artefarita lingvo universala, uzota kiel la sola kulturlingvo.

Pravigo. — La sennaciismo sin apogas sur la historia materialismo, kiu instruas, ke la produktofortoj tendencas al senĉesa malvolviĝo kaj interplektiĝo, kio neeviteble estigos mondekonomion. Tial ke la ideologia superstrukturo, rezultanta grandparte el la produkt- kaj vivkondiĉoj de la homoj, ĉiam malfruas rilate al la ŝanĝoj okazintaj en la produktorimedoj, la sennaciismo celas instrui la homojn racie — ne naciece aŭ religiece, kio finanalize estas la samo — por tiel glatigi la vojon al la historia procezo.

Rimarko. — Principe, la historia procezo povus alkonduki la homan socion al ĝia lasta stadio de malvolviĝo, t. e. al sennacieca stato, per la rimedoj de l' kapitalisma imperialismo. Fakte, ekzistas en ĉi tiu lasta sistemo internaj kontraŭdiroj, kiuj kreas grandan riskon je pereigo de la civilizacio per science organizitaj militoj. Tial la sennaciismo sin apogas sur la proletara klaso, kies interesoj estas tutmonde la samaj. La klasbatalo ja instigas kaj devigas la ekspluatatan klason al pli kaj pli larĝa unuiĝo, kaj tio okazigos la forrenverson de l' ĥaosa kaj krimoplena reĝimo kapitalista.

Konsekvence la proletara sennaciismo havas nenion komunan kun la kapitalista imperialismo aŭ kun la burĝa kosmopolitismo.

Sciigo. — La sennaciisma doktrino estas jam nun embrie aplikata de *Sennacieca Asocio Tutmonda* en ĝia organizformo. Multaj (ne ĉiuj) membroj de tiu organizo celas fariĝi konsciaj sennaciuloj. Ili tamen opinias, ke necesas unue esti praktikinta kaj aplikinta esperanton, t. e. sennaciecan lingvon, dum kelka tempo, por povi kompreni la priparolitan doktrinon. Tial ili ne propagandas ĝin ekster esperantistaj rondoj.

Sennaciano. — Homo, kiu aprobas principe la sennaciismon.

Sennaciulo. — Homo, kiu konscie celas kaj ĉiel eble provas jam nun konformigi siajn pensojn, sentojn kaj agojn al sennaciismo.

Burĝo. — 1. Mezklasulo, ne nobelo, ne proleto. — 2. Homo, havanta kapitalon kaj ekspluatanta laboristojn. — 3. Homo, ne progresema, ne deziranta ŝanĝi la ekzistantan sociordon. Proleto povas esti burĝmensa; homo havanta burĝan pozicion povas tamen ne havi burĝan menson.

Proleto. — Homo, kies vivrimedoj estas la nura vendo de sia laborforto. — *Proletaro.* Klaso de la proletoj. *E. L.*

TRA ESPERANTIO

EL LA REDAKTEJO

Ĉu fine aŭdiĝos nia voĉo? Ĉu daŭros ankoraŭ longe la sendado de materialo, kiun uzi ni ne povas, tial ke ĝi ne konformiĝas al redakciaj postuloj? Ĉu oni ne kompatos niajn okulojn kaj tiujn de la kompostistoj? Cetere ĉi tiuj lastatempe ribelis kaj rifuzis, tre prave, komposti manuskriptojn, kiujn, pro manko de tempo, ni ne povis rekopii. En la redaktejo oni penadas por atingi, ke "S-ulo" fariĝu la plej perfekta el ĉiuj esperantaj gazetoj. Ĉu do ni ne rajtas postuli, ke la kunlaborantoj ankaŭ helpu al ni en tio per atento al niaj rimarkoj? Ni ripetas:

Verku klare, koncize en esperanta — ne en nacieca — stilo; skribu legeble sur unu sola flanko de l' papero kaj ne tro dense por ebligi eventualajn korektojn, ĉu stilajn, ĉu gramatikajn. Ne forgesu, ke ciferplenajn artikolojn ne ŝatas la granda plimulto el niaj legantoj. Ciferabundo ne estas ĉiam signo de objektiveco. Objektivecon oni povas atingi nur penante servi al la vero, ne al iu tendenco aŭ partio. Objektiveco estas rezulto de observemo kaj intelekta honesteco.

Ni sciigas al la verkontoj de "Tago el mia vivo", ke ni jam posedas por tiu rubriko pli ol dek manuskriptojn. Ili laŭvice aperos. Sekve, la K-doj, kiuj intencas verki similajn artikolojn, bonvolu ne rapidi.

Pri tiu rubriko ni jam rimarkigis, ke multaj "Tagoj" tro similas unu la alian. Oni povas eble klarigi tiun fakton per tio, ke la laborista vivo tre similas en ĉiuj landoj. Povas esti. Sed legantoj jam plendis pri la unutoneco de la "Tagoj". Por forigi tiun mankon, K-do 3890 deziras legi pri "Eksterordinara tago el mia vivo". La ideo ŝajnas al ni bona. Ni esperas, ke nia K-do mem sendos la unuan artikolon pri tiu temo.

K-do 1851 proponas la starigon de nova rubriko kun jena titolo: Novaĵoj. *Ĝi entenus resumojn pri la laborista kaj ekonomia movadoj en ĉiuj landoj. Tiun proponon ni ankaŭ ne kontraŭdiras. Ni nur petas, ke la proponinto prenu sur sin tiun taskon. La sperto montros ĉu la Legantaro bonakceptos la "novaĵojn" de nia K-do.*

Ni sincere dankas al ĉiuj SAT-anoj, kiuj interesiĝas pri sia gazeto. Bedaŭrinde estas neeble efektivigi ĉiujn bonajn ideojn. La plej malfacile forigebla manko en nia afero estas la tro malgranda nombro de abonantoj. Ni bezonas almenaŭ 4000 por povi enmeti pli ofte ilustraĵojn aŭ aldonajn paĝojn, kiam bona kaj aktuala materialo abundas.

Nunjare ni eldonos la ducentan n-ron de "S-ulo". Tiu fakto estas sufiĉe atentinda kaj ĝojiga. Sed ĉu ne estas plorinde, ke nun ni havas apenaŭ 3000 abonantojn? Certe ne ĉiu SAT-ano faris sian devon.

Vekiĝu! Varbadu! Ĉe la VIII-a Kongreso, ĉe la apero de la 200-a n-ro, "S-ulo" havu la 4000 necesajn abonantojn! ...

3. 2. 28. E. L.

Pri volontula traduka servo

En "S-ulo" (n-o 167) Dneprano arde rekomendas por laboristaj organizoj la servon de traduk-volontuloj. Laŭ mia opinio, tia aranĝo nur donas unu plian lingvon al la gvidantoj, por interrilati kun aliaj landoj; tio helpus ilin per senpaga servo kaj neniel efikus por disvastiĝo de esp-o. La gvidantoj tute ne deziras, ke la gvidatoj senpere interrilatu — tio ja malgravigus ilian rolon. Sed nia celo estas ja, ke esp-o disvastiĝu ĉe la tuta Laboristaro. Por tion atingi necesas montri al la amaso la utilon, kiun donas nia lingvo. Por tio havas gravan rolon korespondado kun alilandanoj. Sed ĝi okazu ne inter gvidantoj de organizoj, sed inter privataj grupoj, laŭ interesoj formiĝintaj ĉe diversaj profesiaj kaj kulturaj organizoj (kolektiva korespondado). Ekzemple, se iu K-do povas veki intereson ĉe kelkaj siaj samprofesianoj pri vivkondiĉoj de alilandaj K-doj de sama profesio, li proponu al ili ekkorespondadi pri tio. Ili komune prezentu diversajn demandojn, laŭ kiuj la esp-a K-do skribu leteron por alilanda simila grupo aŭ unuopa persono. Ricevinte respondon, li dum ĉeesto de ĉiuj interesiĝantaj laŭtlegu traduke la leteron Same oni povas fari ĉe kulturcelaj unuiĝoj. Ankaŭ oni povas starigi tiucele rondojn ĉe diversaj profunuiĝoj. Tio vekus ĉe multaj la deziron mem senpere interrilati kun alilandaj K-doj.

Korespondadon inter unuopuloj oni povus plivastigi per malgrandigo de elspezoj por afranko. Tion oni povas fari, sendante en unu koverto du apartajn leterojn al du personoj en alia lando. Kompreneble, tio iel ne estas oportuna, kaj povas esti aranĝata nur inter personoj loĝantaj proksime unu al la alia. Kiel jam estas dirite en niaj rondoj: la venko de esperanto venos nur de malsupre. *I. Vahtkerl.*

Faktoj kaj komentoj

Komence de decembro okazis manifestacioj aranĝitaj de diversaj universitataj studentoj. Eniris ili en la preĝejojn de hebreoj kaj disrompis ĉion tie troveblan. Batis homojn renkontitajn sur la stratoj. Rompis la fenestrojn de la butikoj. Kaj faris ĉion sub la protekto de la policanaro kaj sub la gardo de militistoj. Plej multon ili disrompis en Oradea-Mare kaj Cluj.

Pri la manifestacioj la registaro aperigis oficialan komunikon en kiu ĝi diras, ke la registaro permesis aranĝi al studentoj la landan kunvenon, sed ke en la supre nomitaj urboj la *hungaraj kaj hebreaj komunistoj (?) elvokis* la kontraŭagon ĵetante ŝtonojn sur la studentoj.

Sed, ĉu en Faĉet, Predeal ktp. ankaŭ la komunistoj alvokis la studentojn por fari la samon? Kaj ĉu en la diversaj stacidomoj ankaŭ la komunistoj alvokis ilin por bati la vojaĝantojn? Kaj kiam la studentoj faris la supre diritajn banditaĵojn la soldatoj kaj policistoj ridante rigardis.

Mi povas certigi ĉiujn, ke nek la komunistoj nek aliaj laboristoj estis en la proksimeco, ĉar mi konas la rumanan leĝon! Se la laboristoj aranĝus similan "manifestacion" la soldatoj havus la ordonon pafi al ili.

Mi ja bone scias, kiel ankaŭ ĉiu laboristo, ke neniu alia, ol la registaro mem aranĝis tiun ĉi kanajlaĵon por poste arestigi kelkajn laboristojn kaj montri al la eksterlando, ke ili havas energion por sufoki similajn okazintaĵojn.

Do K-doj! Ne kredu tion, kion skribas la diversnaciaj burĝaj gazetoj, ĉar ili estas informitaj per la oficiala komuniko de la rumanlanda ministraro, kiu scipovas sin bone aranĝi por ĵeti sur aliajn similajn barbaraĵojn.

Sennaciece *Vidanto.*



Por nia Distro

Humoro de proleto

Anjo: Patrino, la filineto de nia najbaro M. havas belegan "or-koloran" hararon.

Patrino: Kian hararon? *or*-koloran?! Idoj de *proletoj* havas nur *bulk*-koloran hararon! (Laŭ *AIZ.*)

VORTARO DE ESPERANTO



de KABE (D^ro K. BEIN)

Ĉi tiu internacia vortaro, verkita plene en esperanto, enhavas ĉiujn vortojn de nia lingvo (radikajn kaj devenigitajn), ĝenerale uzatajn de l' esperantistoj, kun esperanta difino de ilia rekta senco kaj iliaj ĉefaj figuraj signifoj. Ĉiu vorto estas difinita kun granda precizeco kaj mirinda klareco. Multaj frazmodeloj por klarigi la sencon de la vortoj kaj igi ilin memoreblaj, faras la verkon alloganta kaj vivanta.

Unu luksa volumo in-8, bindita, 175 pĝ.

Prezo: 2.20 mk. g. inkluz. sendkostojn.

ADMINISTRACIO DE SAT.

Pliintensigo de laborista kulturo

Kial SAT-anoj ne povas pli multe viziti unu la alian? Kompreneble pro la kosto de veturado kaj loĝado. Ĉu helpus nuligi tiun malfacilon, la starigo de dumsomera tendaro, al kiuj junuloj povus migri?

Certe la kunevivado tia estus pli efika ol hotela vivado. La ĉielo ne konas la landlimojn kaj la subĉiela vivado de SAT-anoj konus nek la lingvajn barilojn nek naciajn dividojn. Laŭ sperto en niaj kongresoj, plejparte la junuloj viglaj, kaj energiaj interesiĝas pri nia afero. Post ludado, banado, promenado ktp. vespere, oni kantus komune ĉirkaŭ la fajro, aŭ aŭskultus interesan lekcion. Nia "Petro" jam donis ekzemplon pri tio.

Jen diskutenda afero por la venonta Konferenco. Intertempe K-doj kiuj volus partopreni en tia tendaro en Britio (proksime al Londono), skribu al: *C. H. Brown*, Siesta, Halliford Road, *Sunbury-on-Thames*, Mdx., Britio. *(488.)*



Ĉu ni fondu Turistan Fakon de SAT?

Lastatempe Proletaro staras jam antaŭ la fakto: ke oni ne devas lasi neforigataj ĝisnunajn barojn inter la samklasfratoj. Ne hodiaŭ, do morgaŭ — ni devas esti pretaj por alpreni grandegajn ekskursojn el unu lando en la aliajn. Des pli la esperantistoj-turistoj ĉiam havas la eblecon, sen timo esti komprenataj, vojaĝadi ĉiudirekten. Do, ni devas nin organizi ĝustatempe, nome: nun ni havas tre senteblan mankon, ni ne havas turistfakon interne de SAT; kiu gvidus tutmondan turistaron, presus gvidmaterialon por ili, eldonus detalajn geografiajn kartojn de l' tuta turista mondo, funkciigus en ĉiu lando, en plej belaj lokoj siajn filiojn, kie oni alveturante povus ricevi ĉiuflankan helpon ktp. ktp.

Komenci oni povas per la SAT-kongreso (plej bone samtempe kun ĉi-jara), kie turistoj plej konforme decidos la demandojn pri sia turisma centro, elektos gvidantaron de l' fako, priparolos financan bazon de la fako, filioj en ĉiu lando, skizos kelkajn plej ordinarajn mondmarŝvojojn (rivere, piede ktp.), decidos pri presorgano de turistoj: ĉu krei sian specialan turistan, ĉu aldoni 1—2 foliojn al aranĝo de "S-ulo", por tie presi diversajn rakontojn de turistoj sur la vojo aŭ jam alveturintaj. Ankaŭ tie oni povus presi diversajn marŝvojajn projektojn eltrovitajn de turistoj mem; iliajn anoncojn kaj gvidorganizan materialon.

K-doj turistoj, naturamikoj kaj konsciaj proletoj! Subtenu mian alvokon: sendu al mi vian opinion pri ĉi tiu ideo, por ke ni kolektive esploru, ĉu efektivigebla estas mia projekto pri starigo de Turista Fako de SAT.

A. Semjonov (7113), *Kremenĉug* (Sovetio).

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

Britio. La Instruista Labor-Ligo (TLL) en sia lasta kongreso akceptis proponon, alpreni esp-on kiel internacian lingvon por korespondadi, kaj uzi "SR" por doni kaj ricevi informojn. — La ĉijara kongreso de BLEA okazos 7.—9. aprilo en Sheffield. Sukcese funkcias la korespondkursoj de la NCLC, kaj daŭras la artikoloj kaj notoj en "Daily Herald" kaj "Labour Woman". Novan programon de kunvenoj ĉiusabataj eldonis la Laborista Londona Klubo. — **Germanio.** *Frankfurt-Main.* 8. januaro K-do Roth malfermis nian unuan ĉi-jaran konferencon. Nur duono de la frankfurtaj SAT-anoj ĉeestis. Okazis vigla diskuto pri la venonta SAT-konferenco de l' 5-a sektoro en Amsterdam. La konferenco decidis, okazigi la 5. februaron en Mainz konferencon de la tutdistriktaj SAT-anoj, por pritrakti la Amsterdaman sektorkonferencon. K-do Rud. Schneider (3162), Falkstr., estis elektita peranto kaj K-do Haupt (5662) sekretario. Plue oni menciis, ke ni devas informi regule la sindikatojn, por ke ili vidu prosperon kaj laboron de la SAT-movado. Plue la konferenco decidis, proponi al la asocitago de LEA en Nürnberg, ke la asocio formu esp-o-delegacion por esplori Sovetion. *(5662.)* — *Dresden,* 19. januaro 1928 okazis jarkunveno de SAT-anaro. K-do Szczepanski raportis pri la pasinta jaro. Kreskis la nombro de membroj, sed ne estas sufiĉe komprenita la ideo pri sennaciismo. Ĉi manko estu forigota per diskutoj, helpe de eldonitaj verkoj. Oni unuvoĉe reelektis kiel peranton K-don Szczepanski. Programo de kunvenoj estas: 2. febr. parolado de K-do 2611 pri la sen-laborul-asekura leĝo; 1. marto tradukvespero por gazetaro; 12. aprilo diskuto pri sennaciismo. Kunvenoj okazas ĉiun 1-an ĵaŭdon de l'mon. en popoldomo. *(2611.)* — **Hungario.** 6.—8. januaro okazis kongreso de Hungara Socialdemokrata Partio. En la sekretaria raporto estas menciita — kiel kulturinstituto de la partio — ankaŭ la Hungaria Esp. Societo Laborista. "La esp-ista movado celas la plialtigon de la kultura nivelo de la Proletaro per disvastigado de facila int. lingvo" — diras la raporto i. a. Dank' al tio jam en preskaŭ ĉiuj partiejoj enlokiĝis la entuziasmaj taĉmentoj de la int. lingvo. — **Kanado.** *Sointula, B. C.* Junkomunista sekcio organizis esp-o-grupon en kompartia domo. Grupo estas gvidata. 20 personoj de la vilaĝa loĝantaro partoprenas la kursojn. Kursoj okazas senpage, dufoje semajne kaj estas gvidataj en angla kaj finna lingvoj. Du novaj SAT-anoj. *(10044.)* — **Litovio.** En *Kaŭnas* estis arestita 7.—8. decembro 1927 nia K-do Johano Balĉiunas (7444), kaj kiel multaj socialistoj estis ekzilita al Varniai en koncentran tendaron por ĉiu tempo, dum la "milita" situacio ekzistos en Litovio. — **Sovetio.** *Minsk.* Blankrusia komitato de SEU malfermas korespondkursojn konfirmitajn de la popola komisario por klerigo. En ĉiuj blankrusiaj jurnaloj aperis notoj pri la kursoj. — Dum 1927 Minska Radio-stacio disaŭdigis 32 numerojn de la esp.-lingva radiogazeto. De nun la gazeto estas disaŭdigata ĉiulunde je 22.00—22.30 h. laŭ MET. Ondlongo 1170. La aŭdeblecon konigu al adreso: Minsk, Universitetskaja 16, Radio-stacio. — 5. februaro 1928 oficejo de l' intern. lab. interligo ĉe SEU festas 3-jaran datrevenon de sia ekzisto. Dum ĉi tempo la oficejo sukcesis presi en diversaj blankrusiaj gazetoj preskaŭ 1500 eksterlandajn peresp-ajn leterojn. *(4424.)* — *Novorossijsk.* En aŭgusto al ni venis K-do Vili Zimmermann, el urbo Halle (Germ.), laboristo-masonisto, vojaĝanta tra USSR. Li vizitis kelkajn SAT-anojn, komitaton de SEU. Post tri tagoj direktis sin Transkaŭkazion, ĝis Tifliso; plejparte li iris piede. — En novembro nian urbon vizitis K-do Klein (Aŭstrio), lab. delegito al Oktobraj Festoj. Li restis nur kelkajn horojn, ne vidinte unu esp-iston pro neatendita alveno. — En decembro nin vizitis K-do Paŭlo Kraŭĉ, sekretario de Usona komjunulara unuiĝo, kiu prosperis kunligiĝi kun lokaj esp-istoj, sed en CK de Komjunularo faris raporton angla-lingve pro neĉeesto de bona esp-isto-tradukisto. Lia vizito donis akcelon por esp-o inter komjunularo de N. *(5772.)* — *Vladivostok.* Ĉe Ŝtata Ekstremorienta Universitato (enhavanta la fakultatojn: teknika, agronomia, orientista, pedagogia kaj laborista) fondiĝis Studenta esp-o grupo. Ĝiaj taskoj: korespondado kun alilandaj revoluciaj gestudentaj organizoj kaj izolaj gestudentoj, kaj interŝanĝo de div. materialoj por studceloj. La anoj de la grupo apartenas al SAT kaj ĝia studenta fako. Adr.: G. D. Universitato; K-do K. Fade (3717). — **Svedio.** "Signalen", semajna gazeto por fervojistoj, kiu ĉiunumere havas esp-o-kolonon, enhavis 5. januaron artikolon pri SAT-kongreso en Göteborg kun portreto de K-do Adamson; 19. januaro denove pri la kongreso kun nombro de jam aliĝintaj kongrespartoprenantoj laŭlande. En n-o de 26. januaro tradukon el "S-ulo" (Impresoj pri Sovetio).

NIA POŜTO

3717. — Via kunlaboro por Studenta Paĝo estas dezirinda. Do, ni atendas.

5583. — Ni aperigas vian artikolon. Sed korespondpeton vi devas prezenti kiel anonco (pagata).

10438. — Via artikolo aperos en unu venonta n-o.

10373. — Manuskripto ricevita, aperos siavice. *Red.*

6391. Ni ne scias kie estas haveblaj la de vi cititaj vortaroj. Ni nur povas prizorgi tiujn vortarojn, se vi indikas al ni la eldoniston. *Adm.*

MEMORNOTO

Represis el "Sennaciulo":
Ruĝa Postfronto, Ivanovo-Voznesensk, 22. 1., kliŝigas tutan frontpaĝon de S-ulo n-o 161 kun art. pri M. Hoelz. Represis art. el n-oj 163, 166. *Rabotniĉesko delo,* Sofia, 20. 11. 27, 27. 11. 27, 4. 12. 27, 22. 12. 27.

Represis el "SR.":
The Shop Assistant, London, Inocent Jukov.

Enhavis priesperantajn artikolojn:
Accion Cooperatista, Barcelona, 27. 1., *Signalen,* Stockholm, 5. 1., 12. 1., 26. 1.; *Der prol. Freidenker,* Düsseldorf (super titolo).

Enhavis notojn pri SAT:
Signalen, Stockholm, 5. 1., 19. 1.

Tradukis el esperantaj leteroj:
Sächs. Arb.-Zeitung, Leipzig, 28. 1. (al RFB-konferenco).

Enhavis enesperantajn artikolojn:
ISK, Schlüchtern, januaro.

Ĉe la neŭtraluloj

Citu la nomojn!

Ni ricevis jenajn du leterojn:

"Ĝenevo 28. Januaro 1928

Estimata Redakcio de Sennaciulo

Estus abomene kaj ridinde suspekti sojn Cart aŭ Corret pri mallojaleco al Esperanto kaj mi petas vin publike korekti tiun kalumnion. Laŭ mia scio neniu Akademiano akceptis enmiksiĝi en la strangajn lingvajn marĉandojn, kontraŭ kiuj mi energie devis protesti en "Esperanto"...

Kun afabla saluto via
Edmond Privat."

"29-an de Januaro 1928

Estimata Sinjoro

Vian dilemon sub la titolo "Malkuraĝaj Aludoj", en la N-ro 173 de *Sennaciulo*, ni plene akceptas.

S-ro Privat respondu mem pri tio, kio lin koncernas!

Neniu, kiu nin konas, absolute neniu, povos kredi, ke ni estos kapablaj iam perfidi Esperanton.

Tion klare pruvas nia tuta multjara agado.

Altestime via

Th. Cart

Dr. Pierre Corret

Akademianoj."

Se loko ne mankus en la gazeto, ni volonte komentus larĝe la du akademianajn leterojn ĉi suprajn. Oni rimarku almenaŭ, ke ĉiu persono, kiu konas la historion de la esperanta movado, ne povas, ĉe la lego de la artikolo de s-ro Privat, ne pensi, ke la celitoj estas s-roj Cart kaj Corret. Cetere, ili mem konsentas pri tiu nia aserto, deklarante: "*Ni plene akceptas vian dilemon*".

El tio ni konkludu, ke estis ja "abomene" suspektigi tiujn du akademianojn. Ĉu do la gvidanto de UEA ne komprenas la signifon de la frazoj, kiujn li eldiras?... Ni ripetas: s-ro Privat devas citi la nomojn de la personoj, kiuj estas pretaj perfidi esperanton. Ne decas aludoj, kiuj povas suspektigi ĉiun "eminentulon".

Jam kelkfoje ni diris tute malkaŝe, ke la sinteno de la Akademio estis erara, rilate la landnoman demandon. Prave malprave, s-ro Hodler enkondukis la formon kun *io* en epoko, kiam, pro la milito, tute ne funkciis la lingvaj institucioj. Sekve oni devis ne kondamni kiel herezulojn la uzantojn de la nova formo, sed lasi al la vivo la zorgon decidi, kiu el ambaŭ formoj — *ujo* aŭ *io* — estas pli vivkapabla.

Ĉi okaze ni opinias necese deklari, ke en niaj okuloj s-roj Cart kaj Corret aspektis eble kiel "fanatikuloj", sed ne kiel mallojaluloj.

E. L.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Britio.

K-do *E. B. Green*, 52, Eastfield Road, *Enfield*, Wash., Middlesex, dez. koresp. PI, bfl. Nepre resp.

Bulgario.

— Kursanoj el progresinta kurso dez. koresp. kĉl. L, PK, PI, bfl. Ankaŭ mi persone dez. koresp. Adr.: *K. Uzunov, Petriĉ.*

Ĉeĥoslovakio.

K-do *Johano Riha, Dessendorf, n-o 157,* dez. interŝ. PI, PM, kĉl., precipe kun eksterеŭropaj landoj.

Francio.

K-do *Bourdeau Guy*, 73, rue Barbès, *Bourges* (Cher), dez. interŝ. PI, kĉl.

— Anarĥiista grupo dez. koresp. kun geanarĥiistoj kĉl. Skribu al: K-do *Moreau, 29,* rue de Bonnevide, *S. Denis* (Seine).

Jugoslavio.

K-do *Josipoviĉ Slavko*, Ilirska ul. 48, *Osijek, I,* dez. koresp. kĉl., precipe kun vegetaranoj k. Budianoj, L, PK.

Germanio.

K-do *Paul Gruner*, Chemnitzer Str. 62, *Limbach i. Sa.*, dez. koresp. kĉl. nur PI. Resp. garantiata.

K-do *Kurt Häser*, Seminarstr. 16, *Dresden A. 5,* dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

— Mi serĉas korespondantojn por miaj lernantoj. Skribu multnombre. Resp. garantiata. Adr.: *O. Kretzschmar,* Luisenstr. 6, *Meissen i. S.*

— 50 gekursanoj dez. koresp. kĉl. per mallongaj L, PK, PI, tuj resp. Adr.: K-do *Hans Heretsch,* Alsenstr. 57, *Breslau, VI.*

K-do *Erich Kaiser*, Dresdner Str. 4, *Rähnitz-Hellerau i. S.*, dez. koresp. kĉl. L, PI, bfl., precipe kun kompostistoj.

K-do *Alwin Döring, Leutersdorf, A. 11, i. S.* ĉiam interŝ. L, PK, PI, gaz., jurnalojn ktp. Skribu multnombre! Resp. garantiata.

K-do *Hans Berka, Jonsdorf, 58, apud Zittau i. Sa.*, dez. koresp. kĉl. L, PI, PM. Resp. garantiata.

K-do *Osw. Heinrich, Jonsdorf, 18, ap. Zittau i. S.*, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

K-do *Graetz*, Waldemarstr. 17, *Rostock* dankas por alsenditaj poŝtaĵoj. El Sovetio ni ricevis tiom da korespondaĵoj, ke ne eblas respondi al ĉiuj. Pardonu Gek-doj! La kaso ne permesas tion.

Rumanio.

K-do *Francisko Abel*, Jud. Arad, *Ineu*, dez. koresp. L, PI, interŝ. nacilingvajn gaz. kĉl.

Sovetio.

Gek-doj *Sofio* k. *Jozefo Ŝac*, Vjerĥn. Kolonja, 39, kv. 1, *Kamenskoje*, Dnep opetr. okr., koresp. kun gejunuloj ĉl.

K-do *Kurcik*, Komsomolskaja. 25, *Minsk*, koresp. kĉl. por junulara gazeto.

— Esp. Rondeto ĉe Vilaĝ. mastr. metiejo koresp. kun metalistoj, Adr.: *Minsk*, Pervomajskaja, 3, *Selĥozmasterskije im Burbisa.*

— *Juda Klubo je nomo de Roza Luksemburg*, Bolotov per. 14, *Nijni-Novgorod*, dez. koresp. kun kolektivoj k. individuoj pri lab., metiista k. junulara vivo, kontraŭreligia movado, socilukto ktp.

K-do *Hermann Konovalov*, Teatralnaja pl. d. 6. kv. 11, *Nijni-Novgorod*, dez. interŝanĝe ricevi germanlingvajn librojn k. revuojn kontraŭ ruslingvaj. Sendu antaŭe proponojn.

K-do *Aleksandro Kurprijanov, Sormovo*, Nijegorodskoj gub., Zavod "Krasnoje Sormovo", Zavodskaja Tipografija, rab. 6596, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

K-do *L. I. Ploŝkin, Sormovo*, Nijegorodskoj gub., Zavod "Krasnoje Sormovo", Zavodskaja Tipografija, rab. 25621, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

K-do *A. Vagner*, Urickaja ŝkola, 2, *Naro-Fominsk*, Mosk. gub., dez. koresp. precipe pri literaturo, artoj k. pedagogio, L, PI.

— Dudek gestudentoj dez. koresp. kĉl. Ĉiam resp. Adr.: *Voldemaro Sorokin*, Gorbataja, 25, *Novoĉerkask.*

K-do *Nikolao Ĉerni*, Truĥanov Ostrov, Naberejna, 17, 2, *Kiev*, dez. koresp. pri div. temoj kĉl. Resp. garantiata.

K-do *Nikolao Kozlakovski*, Deĥtjarna-str. 13. 6, *Kiev*, dez. koresp. kĉl. PI, gaz.

K-do *R. Sikorski*, Verĥne-Piatnicka, 9, kv. 2, *Smolensk*, dez. koresp. kun instruistoj de matematiko kĉl.

K-do *S. B. Libermann*, ul. Jukovskogo, 29, *Odessa*, dez. koresp. k. interŝ. presaĵojn, L, PI, kĉl. ktp.

K-dino *A. Rymar*, Blijnije Melnicy, Zorinskaja, 3-4, *Odessa*, dez. koresp. kĉl.

K-dino *O. Nemirovskaja*, Blijnije Melnicy, Zorinskaja, 18—3, *Odessa*, dez. koresp. kĉl.

K-dino *S. Glocer*, Gospitalnaja, 65—14, *Odessa*, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

— Ĉiu, kiu dez. ricevi detalan let. pri vivkondiĉoj de Sovetia junlaboristaro, skribu saman al K-do *Ginesski*, Kominterna, 21—10, *Odessa.*

K-do *K. Linda*, Smirnovskaja, 4—12, *Odessa*, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

— *Lab. Int. kor. oficejo ĉe Gubkom SEU*, poŝtkesto, 305, *Leningrad*, koresp. kaj pera kor. inter labor. polit. organ., espergrupoj, interŝ. mater. por preso kaj ekspozio.

Ĵus aperis:

Humor' de l' mondo en Esperanto

de D-ro **Emil Pfeffer**

La ŝerco, sprito kaj anekdoto de diversaj popoloj en Esperanto kun akompanata germana teksto kaj lingvaj klarigoj. **96 paĝoj — Prezo 0.50 mk. germ.**

De la sama aŭtoro: mk. germ.

Esperanto en 10 lecionoj (lernolibro por germanoj)	0.25
Unua Esperanta legolibro por komencantoj kaj kursoj	0.25
Vortaro Esperanta-Germana	0.25
Vortaro Germana-Esperanta (30 000 tradukoj)	1.—
Ĉu vi parolas Esperante? (Enkonduko en la esperantan konversacion)	0.25
Esperanta Komerca Korespondo	0.50

Administracio de SAT, R. Lerchner, Leipzig O. 27, Colmstr. 1.

Poŝtĉek-Konto 6835.

Sovetio. (Daŭrigo)

— *Esperanto-Komitato de SEU* (Labesko), *Dnepropetrovsk*, dez. koresp. kĉl. L, pri lab. movado, virina vivo, sporto. Interŝ. gazetojn, esp. librojn. Resp. garantiata.

K-do *S. Teplouĥov*, Zavkom. *Lysva*, Permsk. okr., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

— Anoj de esp. rondeto, dez. koresp. kun esp-istoj de Germanio pri ĉ. temoj, L, PK, PI. Resp. garantiata. Adr.: K-do *Gromov*, Leninskaja, 92, kv. 1, *Blagoveŝĉensk*.

— Fervojista Klubo, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L, PK. Adr.: *Samara*, Lva Tolstogo, 94, Pravlenije j. d., *Kluba imeni Revolucii*, 1905 g.

K-do *V. V. Kalaŝnikov*, Gruzinskij per. 6, kv. 6, *Nijni-Novgorod*, dez. koresp. kĉl. kun financ-, bank-, asekur- k. ŝparkasoficistoj k. IRH-anoj pri vivkondiĉoj, laborkondiĉoj, laborteknike k. IRH-movado. Ĉio interesa estos uzata en preso. Resp. garantiata.

K-do *A. P. Lanovenko*, Paŝperovski zavod, *P. O. Tetiev* forveturis el la hejmloko. Nun li estas en Belaja-Cerkov. Tamen ĉi-adreso ankoraŭ ne estas konstanta.

— Junulo dez. koresp. kĉl. L, PK, PI. Adr.: K-do *Leonid Lukaŝeviĉ* (Iernanto), Pleĥanovskaja, 5, *St. Perovo*, M.-Kazana fervojo.

— 30 kursanoj ĉe lab. fervojista klubo dez. koresp. kĉl. L, PK, PI, gaz., ĵurn. k. s., pri laborkondiĉoj, salajroj, lab. movado, klasbatalo k. s. Adr.: *Rabočij Klub*, Kruĵok Esperanto, *St. Perovo*, M.-Kazan. j. d.

K-do *I. Borisov, Omsko*, 9, linia, 58, dez. koresp. kĉl. L, PK, PI pri pedagogio, vivmaniero k. a. demandoj.

K-dino *Tomĉuk*, kontoro prjadilinjh fabriko, *Naro-Fominsk*, Mosk. gub. ŝanĝis sian adreson k. dez. koresp. pri div. temoj, L, PK, PI.

— Esperantista Komitato anoncas, ke K-do *S. N. Aptekman* estas peranto por junulorganizoj, kom. jun. ĉeloj k. pionirorganizoj de urbo Rostov/Don. Adr.: *Rostov/Don*, Srednij pr. 39, kv. 6.

K-do *A. F. Semenov*, Sovapteka, *Buguruslan*, Samar. gub., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. L, PK, PI.

— Laboristaj koresp-antoj de loka murgazeto dez. koresp. kun Labkoroj el ĉl. pri div. temoj. Adr.: *Kiev, Petrovka*, Konstantinovska, 5, Klub Vodnikov al K-do Kovalenko.

K-do *A. Sokolov*, B. Spaaskaja, 12, kv. 13, *Moskvo*, 10, dez. koresp. L, PI, gaz., pri jun. movado k. a. temoj. Resp. garantiata.

K-do *Paŭlo Trofimov*, Kurskaja, 13, *Kamenskoje*, Dnepropetr. okr. dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

K-do *L. Narviŝ*, Ĵeleznodoroĵnaja-str. 5, *Kamenskoje*, Dnepropetr. okr. dez. koresp. kun ĉl. gejunuloj.

K-dino *Ĥaja Joffe*, Poĉtovaja, 5, *Kamenskoje*, Dnepropetr. okr. dez. koresp. kun ĉl. gejunuloj.

K-dino *Viŝnevskaja*, Pavlovskaja, 4, *Kemenskoje*, Dnepropetr. okr., dez. koresp. kun ĉl. gejunuloj.

K-dino *Ĥort*, ul. Derĵinskogo, 38, *Kamenskoje*, Dnepropetr. okr. dez. koresp. kun ĉl. gejunuloj.

Svedio.

— Esp.-rondo de laboristoj dez. koresp. kĉl. L, PI. Resp. garantiata. Adr.: K-do *Hj. Häll*, Box. 21, *Bollebygd*.

Usono.

K-do *G. J. Kroes*, 1869, Madison avenue, *New York, City*, dez. koresp. pri ĉ. temoj. Interŝ. PI, esp. gaz.

ATENTU!

Ĉu vi volas ricevi informojn pri vivo de unua proleta ŝtato? Faru demandojn! Adresu: USSR, *Odessa*, Puŝkinskaja, 32, "Izvestija" *Esperanto-Fako*. Nepre respondas!

ATENTU!

Laboristoj k. oficistoj de Rjeva Alkohol-branda Uzino, dez. koresp. kolektive kĉl. pri ekonomia situacio, mor- k. laborkondiĉoj ktp. Personaj let. estas ankaŭ resp. Ni petas niajn K-dojn kunagi kaj plifaciligi interrilatojn. Adr.: *USSR, Rjev*, Tverskoj gub., Spirtovodočnij Zavod, *Zavkom*.

ATENTU!

Loka Komitato de SEU koresp. kun laboristaj organizoj k. individuoj el ĉl. — Petas sendi esperantajojn por arangota ekspozicio. Respondo garantiata. Adr.: K-do *Borovskij*, Krasnoarmejskaja, 35, Partŝkola, *Novorosijsk* (USSR).

Atentu eksterlandaj Gek-doj!

! Estas petataj ĉiulandaj aktivaj SAT-anoj, korespondemuloj por individua aŭ kolektiva korespondado. Skribu pri viaj labor-, viv- k. salajrokondiĉoj en via laborejo, fabriko aŭ oficejo. Interesaj leteroj aperos en nia murgazeto, kiu aperadas de la 7-a de novembro 1927. Al interesatoj respondo estas garantiata pri samaj temoj. Ĉion adresu al: *Esperanto-ĉelo ĉe Telefona uzino je nomo de V. I. Lenin, Nijni-Novgorod*, Miza, Red. Kolegio (USSR).

ATENTU!

Geesperantistoj tutmondaj! 4. marto 1928 nia grupo festos la inaŭguron de nia standardo. Se eble, venu k. estu niaj gastoj en Nowawes (urbo inter Berlin k. Potsdam). Aŭ almenaŭ sendu salutleterojn! Montru, ke la solidareco inter la proleta esp-istaro vivas! Super niaj kapoj flirtu ruĝa standardo kun verda stelo!

Laborista esp. grupo
"Ni estu fratoj!" Nowawes
(Germanio).

Atentu!

Por povi montri, ke en la tuta mondo ekzistas esperantistoj, ni petas sendi al ni belajn PI, PK bfl. por propaganda vespero. Skribu ankaŭ kiu dez. koresp. Ĉiuj ricevos resp. Adr.: Esperanto-Grupo "Progreso", Leinbachstr. 40, **Neckargartach**, Wttbg. (Germanio).

Dek jaroj de Ruĝa Armeo!

Ruĝfront-batalantoj de Germanio, Aŭstrio k. a. klaskonsciaj proletoj sendu viajn salutojn k. bondezirojn al tago de la 10-jara ekzisto de laborista-kamparana Ruĝa Armeo (ne pli malfrue ol la 15. 2. 28). Rekompence ni sendos ruĝarmeajn gazetojn, jurnalojn, fotojn k. esperantlingvan leter-historion de R. A.

Adresu: *USSR, Odessa*, Puŝkinskaja, *32, "Izvestija"*, Esperanto.

SAT-anoj! Atentu!

La "Perespkom." de distrikto Orient-Saksio starigis jenajn korespondfakojn por laboristaj organizoj:

Tekslaborista sindikato:
Paul Frenzel, Gross-Schönau.

Metallaborista sindikato:
Lignaĵista sindikato:
H. Scherbaum, Gross-Schönau

Konstrulaborista sindikato:
Max Männig, Sommerau.

Socialdem. Partio:
William Hennig, Bertsdorf.

Komunista Partio, RFB:
Alfred Spitzer, Neugersdorf.

Intern. Ruĝa Helpo:
Intern. Laborista Helpo:
Reinhard Rudolph Olbersdorf 160 a.

Konsumkooperativo:
Artur Guhr, Seifhennersdorf.

Naturamika movado:
Marta Roscher, Seifhennersdorf.

Liberpensularo:
Karl Krause, Warnsdorf, Ĉeĥoslov.

Sportularo:
Franz Kletschka, Neu-Eibau.

Gek-doj, koresp. kun ni pri ĉ. gravaj problemoj. La materialon ni bezonas por murgazetoj, ĉiutagaj gazetoj kaj kunvenoj. Helpu al ni plenumi nian servan devon! Respondo garantiata!

Kolektivajn korespondaĵojn sendu al la gvidanto de "Perespkom.": K-do **Hermann Scherbaum, Gross-Schönau i. Sa.**, Teichstr. 9 (Germ.)

ATENTU!

Kun *ĵurnalistoj kaj verkistoj* ĉiulandaj mi dez. konstantan interŝanĝon de artikoloj, interesaj raportoj, rakontaĵoj ktp. pri diversaj temoj. K-do *G. Nitzsche*, Zwickauer Str. 152, *Chemnitz (Germanio)*.

Atentu! K-do Mikaelo Kojevnikov (loĝis antaŭe en Visimo-Ŝajtansk) ŝanĝis adreson pro sia oficŝanĝo (antaŭe lernejestro, nun inspektoro de l' socia edukado). Lia nova adreso: **Alapaevsk**, N-Tagilsk. okr. Ural — Rajispolkom, USSR. De ĉiuj siaj korespondantoj li petas pardonon pro longa nerespondo. SAT-anoj, korektu vian 262-an paĝon de jarlibro!
(SAT-ano 7053)

ATENTU!

SAT-rondo Rabenstein deziras koresp. kun grupoj k. individuoj pri div. temoj kĉl.

Adr.: K-do Karl Kämpfe, Forststr. 27, **Rabenstein ap. Chemnitz** (Germanio).

SAT-anoj!
En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉiam citu vian membro-numeron.

ENHAVO:

Pri Svedio kaj la Kongresurbo . pĝ.	155
Maskobaloj . . . . „	156
Por la patrioj . . . . „	156
Nacia frenezeco . . . . „	156
Indiĝenaj moroj en Angola . . . „	157
Por la juna Sacco . . . . „	157
Nia klubo . . . . „	158
Tago el mia vivo . . . . „	158
Diiinoj . . . . „	158
Faktoj kaj komentoj . . . . . „	159
Por nia Distro . . . . „	159
Tra Esperantio . . . . „	159—61
Korespondado, anoncoj . . . . „	161—62

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)